# *Domo de trobadoroj celebras sian 53-a jubileon en Santiago de Kubo*



La emblema Domo de Trobadoroj (Casa de la Trova) festis sian 53-jaran jubileon kun la sindevigo protekti la ?enrojn lulitajn en la orienta provinco  Santiago de Kubo, kiel atestas  la deklaro kiel Muzika Referenco de Latin-Ameriko fare de la Latina Instituto pri Muziko la 25-an de julio.

Nepre vizitinda de landanoj  kaj eksterlandanoj, la instala?o estas adapti?inta al  la novaj manieroj fari kaj komerci muzikon, markitajn de la cifereca erao, sen perdi la esencon de viva muziko, la genezo de ?ia kreado en 1968 pro la rapida agado de popularaj  artistoj kiel Ángel Almenares kaj Virgilio Palais.

La Muzika Katedralo de Santiago de Kubo, kiel ?i anka? estas identigita, konsistigas la ?efan lokon de la Internacia Trobadora Festivalo "Pepe Sánchez" kiu okazas ?iujare en la monato marto, kaj en ties lasta eldono ?i estis dedi?ita al la majstro Alejandro Almenares, lasta eksponento de la tradicia trobadora arto.

---

# Radio Habana Cuba